

LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTO-
RÖRELSEN I SVERIGE

UTGIVEN AV GEFLE
ESPERANTOFÖRENING


Officiellt organ för Svenska Esperanto-Förbundet (S. E. F.) och Norvega Esperantista Ligo (N. E. L.)

3a Jaro
N:o 12.

Redakcio: J. LUNDGREN, Hedemora, J. HELSING, Gävle, H. BONNEVIE, Kristiania Adreso por korespondado: Gävle, Svedujo. Ansvarig utgivare — Responda eldonanto kaj administranto: W. WAHLUND, Gävle. Prenumerationspris för 1916 — Abonprezo por 1916: i Sverige 1: 50 kr., i Norge 1: 75 kr., eksterlande 1: 1 Sm. (2: — kr.). Lösnummer 15 öre. Annonsspris — Anonprezo: 5 öre pr mm.

Decembro
1915.

Friedrichs-Polytechnikum i Cöthen (Anhalt).



Bland de läroverk i Tyskland, i vilkas studieplan Esperanto upptagits, är Cöthens Polytechnikum ett av de förnämsta.

La Frederiko-Politeknika lernejo en Cöthen estas ŝtate subvenciata studejo laŭ universitata plano, t. e. ke lekcionoj kaj ekzercoj dependas de elekto de la studentoj mem.

La celo de la lernejo estas, ke ĝi donu al junaj viroj taŭgan instruadon en la praktike aplikitaj teknikaj sciencoj. Por akcepto oni postulas abituriantan ateston de reallernejo aŭ samgradan edukitecon. La studoj daŭras ĝenerale sep semestrojn^{*}), kaj la nun pasanta se-

^{*}) semestro = studperiodo de iom malpli ol duonjaro; do tre diferenca de la svedlingva sencio semester-ledighet.

mestro (la vintro 1915—16) estas la 50a de la lernejo, kiu do baldaŭ povos solenigi 25jaran jubileon. Post la fino de la 4a semestro okazos la »ingeniera antaŭekzameno» por provi la matematikan-sciencan bazon por la sekvonta pli esenca fakstudado, kaj post la 7a semestro la ĉefekzameno. Kiel ekzamenanto ĉe la ĉefekzameno funkcias registara komisararo krom la ekzamen-komisio. La nuna studplano ampleksas jenajn fakojn: 1. maŝinkonstruo, 2. elektrotekniko, 3. teknika kemio, 4. gaso-tekniko, 5. papertekniko, 6. sukertekniko, 7. metalurgio, 8. tas-

koj de komercaj inĝenieroj, 9. keramiko-, briko- kaj cement-tekniko, vitro- kaj feremajligo-tekniko, kaj 10. ĝeneralklerigaj sciencoj. Krom tio, la Asocio de germanaj paperfabrikistoj fondis ĉe la lernejo specialan fakurson por papermajstroj, kun kvarsemestra daŭro.

La studentnombro ĝenerale estis inter 500 kaj 600, sed pro la nunaj cirkonstancoj ĝi kompreneble malgrandiĝis konsiderinde, kiŝo tamen ne malhelpis la funkciadon de la lernejo. Relative granda parto el la studentaro estas negermanoj, kaj ankaŭ kelke da sinjorinoj estas kal-

kuleblaj en ĝi. Inter la »Kommitonon» cetere evoluis kaj floras kamaradaroj laŭ ĝenerale germana universitata moro, kaj kun nomoj el kutima tipo: Arminia, Thuringia, Baltia, k. t. p.

Friedrichs-Polytechnikum dediĉas viglan atenton al la teknika evoluo de la kulturo, kaj do ĝi depost kelkaj semestroj aranĝis specialajn lekciojn kaj ekzercojn rilate al aerturiloj, malpezaj motoroj, aŭtomobilkonstruo, elektra alttensia tekniko, radiotelegrafio, kaj ankaŭ Esperanto. Esperantoinstruisto (»lektoro») ĉe la lernejo estas S:ro Hermann Mangelsdorff, kiu tamen nuntempe forestas kaŭze de la milito. Dumtempe S:ro Profesoro Foehr kondukas la Esperanto-studojn ĉe la lernejo.

Ransäter: Almstedt, Carl,
Sala: Ehlin, A. O., Wedin,
Louise, Storsvik: Andersson,
P. J., Tidaholm: Hante, W.,
Trälleborg: Carlsson, M.,
Wadstena: Andersson, Aifr.,
Örebro: Ågren, Arvid
po 100 ekz.=4000 »
Transporte 7300 ekz.

Al ĉiuj supre nomataj ni volas esprimi nian koran dankon por bonega kunhelpado en nia laboro por la disvastigo de nia kara lingvo Esperanto.

Sveda Esperanto-Federacio, Gävle.



Funebra marŝo.

El »La Ofroj de la milito, pri-skriboj kaj bildoj el la invalidinter-ŝanĝo, de Knut A. Norling.

Ni rampas, per ligneroj ni lamas.
Ni trenas la malmulton restantan post agad' de l' kuracista tranĉil'.
Ne volis la morton nin preni,
kaj la viv' nin jam nur povas havi
kiel rompajojn de homaj estajoj,
kiel korprestajojn vivantajn.

Per tri ambaŭdirektaj vagonaroj ĉiusemajne — Trelleborg--Haparanda kaj kontraŭdirekte — la invalidoj nun estas transportataj tra Svedujo. *)

Estas »funebra marŝo» montranta la plej teruran aperon de la milito. Antaŭ unu jaro tiuj ĉi viroj estis feliciaj, junaj, fortaj. Nun ili restos rompajaj.

Kion pensas ili, la kompatinduloj, kiam ili la belajn tagojn de la somerfino veturas tra la ĉarbelaj svedaj pejzaĝoj, vidante la beletajn malgrandajn kamparomojn ĉirkaŭitajn de verdaĵo, vidante la popolon diligente laborantan por kolekti en la garbejojn la rikolton? Kiu ri-

*) Sed la 9an de septembro la angla gazeto Times raportis, ke la rusaj invalidoj, revenintaj el Germanujo, estas veturigataj surmare al Stokholmo, kie ili per Sveda Ruĝa kruco estas translokigataj po 200 en pramojn, per kiuj ili poste estas transportataj al Torneå (do laŭlonge de la Botnika golfo, je proksimume 600 anglaj mejloj, trans la maron). La germanoj kontraŭe, venintaj el Rusujo, estas transportataj vagonare al Torneå, kie la svedaj aŭtoritatoj ricevas ilin. K. t. p. K. t. p.

Noto de la tradukinto.

koltas tie hejme? Ĉu la ĉefdezertigisto Morto nun iradas tie; ĉu la fundon ankoraŭ kolorigas ruĝa la sango de amikoj kaj parencoj!

En la rigardoj de la invalidoj aperas tiom da demandoj — demandoj kies respondo ili ne trovas. Ili demandas, kial la tuta tiu ĉi teruro trafis ilin, kial ili devis klopodi por pereigi homojn, al kiuj ili deziris saman feliĉon kiel al si mem, kial tiu ĉi terura milito neniam finiĝas.

Tamen ili ĝojas. La ĉefa ĝojkaŭzo evidente estas, ke ili venos hejmen, hejmen al patro kaj patrino, hejmen al edzino kaj infanoj. Kaj dum la alhejma vojaĝo ili troviĝas ja bone: ĉie afablaj homoj, kiuj mem ne scias kiom bone ili volas fari, abunde da manĝaĵoj, bela varma lito por elripozado.

La arĝente radianta luno tra la vagonaj fenestroj brilas sur feliĉaj vizaĝoj: la elturmentitaj trajtoj kvazaŭ mildiĝis.

Dum tiu ĉi kompata agado okazas tie ĉi en nia lando, la bataloj pli kaj pli furiozas sur ĉiuj frontoj. La telegramoj — ĉu el Berlino, Vieno, Petrogrado, Parizo, Londono Romo aŭ Konstantinoplo — ĉiutage rakontas pri la intencado de la bataloj. »En la venkakitita pafistofosajo ni trovis amasojn da mortintoj», »nia fajro tute detruis la antaŭen kuregantojn», »niaj perdoj estas gravaj, sed la malamikaj estas pli grandaj» — ja ĉiutage oni rakontas.

Oni eble tiel kutimiĝis je la esprimoj en tiuj raportoj, ke oni malmulte atentis ilin. Sed tiu, kiu vidis tiujn ĉi kompatindajn homrestajojn, kiuj nun estas transportataj tra Svedujo el nur tri el la militantaj potencregnoj, li estas devigata pripensi. Li pripensas, ke ĉiu el tiuj »furiozaj bataloj» pli grandigas la nombron de tiuj ĉi senbrakaj kaj senkruraj, de tiuj ĉi tuberkulozaj, de tiuj ĉi blindaj, de tiuj ĉi frenezaj — — —

El la sveda lingvo libere tradukis Jln.



La Nobel-premioj.

Laŭ decido de la instruantaro de la medicina alternejo en Stokholmo la 29an de oktobro, Doktoro Robert

Venditaj propagandiloj de $\frac{9}{10}$ — $\frac{23}{11}$ 1915.

Stockholm: Stockholms Esperantoförening per Helmi Josefson 1000 ekz.

Borås: Borås Esperantof.,
Gävle: Kafé Esperanto kaj
Upsala: Finn E. L:son
po 500 ekz.=1500 »

Gävle: Helsing, J., Pehrson,
Rud. kaj Svensson, O. S.,
Malmö: Pettersson, John
po 200 ekz.=800 »

Benqtsfors: Winberg, Carl,
Bomhus: Jönsson, G., Lindström, Gust.,
Borås: Roesel, Otto,
Brodbo: Wiman, Adolf,
Eksjö: Florell, Th.
Eskilstuna: Asplund, Nanny,
Falun: Westman, E. J.,
Försläf: Wieslander, Caroline,
Grängesberg: Nyberg, G.,
Gävle: Adamson, Einar,
Hellström, Aug., Hjelm, Anton L., Liljemark, Alb., Olsson, Franz A., Pierrou, Osc., Sundberg, Erik, Trång, R., Wahlund, G., Wickman, D., Örn, A. K.,
Göteborg: Axelsson, Ax., Johansson, J. W.,
Hedemora: Lundgren, John,
Harnäs: Magnusson, O.,
Hultagård: Persson, Elin,
Kavlås: Höglund, K. J.,
Kristinehamn: Hjærtstädt, O. W.,
Lerum: Pettersson, And.,
Linköping: Arre, Bengt,
Morjärv: Carlsson, W. G.,
Nässjö: Prior, W.

Bárány en Vieno estas elektita kiel medicina premio je la premio de 1914 kaŭze de siaj esploroj pri fiziologio kaj patologio de la vestibularaparato. La decido pri la medicina premio de 1915 estas prokrastata.

Doktoro Bárány estas ankoraŭ juna viro, naskita 1876. Estas neordinare eminenta kuracistkariero, kiu nun estiĝis rekompencita.

La vestibularaparato, kies esplorado de D:ro Bárány estas menciita ĉe la premedico, estas ekvilibra organo centrimita en la cerbeto kaj kun speciala ilo en la labirinto de la orelo.

D:ro Bárány funkciis en Przemysl kiel kuracisto dum la sieĝo, kiam li eltrovis kaj kun bonegaj rezultatoj aplikis specialan metodon por kraniaj operacioj je pafvundoj. Post la kapitulacio li kiel militkaptito troviĝas en Azia Rusujo, kie dum kuracista agado inter siaj kunkaptitoj li mem infektiĝis dum malarie epidemio.

La scienca akademio ĉe kunveno 11an kaj 12an de novembro decidis liveri la premiojn en fiziko kaj kemio al jenaj personoj:

la fizikan premion de 1914 al D:ro Max von Laue, profesoro ĉe la universitato en Frankfurt am Main, pro lia eltrovo de la difrakto de Röntgenradioj en kristaloj.

la kemian premion de 1914 al Theodore William Richards, profesoro ĉe Harvarduniversitato en Usono, kiel rekompenco pro liaj precizaj difinoj de atompezoj.

la fizikan premion de 1915 al profesoro William Henry Bragg en Leeds kaj lia filo W. L. Bragg en Cambridge, kaŭze de iliaj meritoj je esplorado pri kristalstrukturoj per Röntgenradioj, kaj

la kemian premion de 1915 al profesoro Richard Martin Willstätter ĉe la Imperiestro-Vilhelmo-instituto en Berlin-Dahlem, pro esploroj de kolorsubstancoj en vegetaloj, precipe la kloroŝilo.



La nova edzino.

— Panjo diris, ke mi metu la ovojn en malvarman akvon, kaj ke mi sentos kiam ili estos prete kuiritaj. Nun mi staris tie ĉi jam duonhoron, sed ankoraŭ mi sentas nenion.

Konkuranto de radi-umo.

En Nanrangan-montoj en la distrikto Ferghana (Rusa Centralazio) oni eltrovis novan, misteran substanceton, kies ecoj ŝajnas tiel mirindaj ke ili superas tiujn de la radi-umo.

Esploristo trovis en la nomitaj montoj mineralojn, metalojn, glimon kaj ankaŭ malgrandajn kvantojn de tute nekonata metalo havanta malpur-brunan koloron kaj neordinare peza. Li kunportis kvanton de la metalo al Moskvo kaj transdonis ĝin al Ĥemia laboratorio por esti esplorata.

Oni faris multajn provojn, kiuj donis la plej surprizantajn rezultatojn. Kiam la nova materio estis metata proksime de acido, tio rezultis forta froston kaj la glaso enhavanta la acidon pulveriĝis.

La esploroj estis referataj kun ujoj de ŝtono, porcelano kaj argilo, — ĉiam la sama sensanga rezulto, la mistera metalo kunigite kun acido pulveriĝis ĉion.

Oni ankaŭ faris provon kun feraj ujoj, sed rezultis la samo. La Ĥemiistoj poste uzis grandan granitblokon; ĝi disiĝis baldaŭ ne produktante gason kaj sen eksplodo, sed malaltiĝis la temperaturon. Kiam oni prilaboris la saman metalon per alkaloj (lesiv-saloj), tiam perdis la ujo 20 % de sia pezo.

La nova metalo ankaŭ havas valorajn sanigajn ecojn. En sciencaj rusaj rondoj, oni opinias ke la mondo staras antaŭ grandega surprizo, eble pli granda ol tiu, kiun kaŭzis la eltrovo de la radiumo.

El Norsk verksteds og støperitidende (Norvega fabrika kaj fandeja ĵurnalo)

Trad. O. Br. Sl.



Til de norske abonent.

»La Espero» forblir vort organ ogsaa i det kommende aar. Kontingenten er fremdeles kr. 1.75.

Forhaabentlig er de fleste av dere fornøyd med bladet. — »Bare de fleste?» — Ja, vi har nok hørt at en og anden snarere er fornøyd av det, fordi »der staaer for meget svensk i det», underforstaat snart

»og forlitet esperanto», snart »og forlitet norsk». Hvad det sidste punkt angaar, er det idetmindste ikke hovedredaktørens skyld; hvad kan han for at vi norske ikke altid passer paa at sende ind noget norsk i rette tid? Sml. den forrige redaktørs oprop i februarnumeret (»Al niaj norvegaj samideanoj»). Vi medgir at helst alle 3 sprog bør være repræsenteret i bladet; men sker nu dette ej altid, saa la os dog paa begge sider av Kjølen trøstigen praktisere saameget av praktisk skandinavisme at vi ugenert læser hinandens sprog, hvad jo ogsaa den nye retskrivning merkbart letter os vejen til.

Men »forlitet esperanto»? Neppe for dem som virkelig læser bladet og icke lar sig skræmme av at de ofte maa biade et stykke indover for de kommer til esperantoteksten. Selv skriver redaktionen — baade den svenske og den norske — hellere esperanto end skandinavisk; men foruten at propagandahensyn tjener til motvegt, tar vi gjerne imot yderligere praktiske bidrag til fremme av sproglig likevegt i vore spalter.

H. Bonnevie.



Avizo.

La Espero estos eldonata dum 1916 laŭ sama plano kaj kun sama tendenco kiel ĝis nun. Ĝia ĉefa tasko estas, ke ĝi estu ligilo tiel inter la samideanoj en Svedujo kaj Norvegujo, kiel ankaŭ inter tiuj ĉi unuflanke kaj alilandaj samideanoj duaflanke. En la literatura fako publikiĝos alterne mallongaj noveloj, specimenaĵoj partoj el pli grandaj verkoj, popularsciencaj aŭ historiaj artikoloj, vojaĝleteroj, k. t. p. — aŭ originaloj aŭ tradukaĵoj, tiom, kiom la limigita amplekso de tiu fako permesos. La tekstoj estos elektataj kiom eble kun konsidero ne nur al la bezono de facilaj ekzercegaĵoj por komencantoj, sed ankaŭ laŭ pli altaj postuloj, kiujn inda literaturlingvo devas plenumi. Ni direktas al alilandaj samideanoj peton, ke ili plej eble apogu nian malgrandan gazeton, kaj per tio ankaŭ akcelu la helpingvan movadon sur la skandinava duoninsulo. Ni esprimas sinceran esperon, ke sukcesos niaj klopodoj por fari la gazeton tute valora je sia malalta prezo.

ANMÄLAN.

La Espero utkommer under år 1916 enligt oförändrad plan.

Tidningen kommer således att meddela uppgifter om Esperantorörelsens fortgång jorden runt, artiklar för belysande av det mellanfolkliga hjälpspråkets betydelse för olika slag av internationela förbindelser ävensom anvisningar och råd för studerandet och användningen av detta språk.

Ät den litterära avdelningen kommer, så långt det begränsade utrymmet medger, att ägnas den uppmärksamhet som kräves av dess stora betydelse. Sålunda skall, vid valet av texter, hänsyn tagas såväl till nybörjares behov av lättare läsövingar, som ock till det berättigade kravet, att Esperanto såsom litteraturspråk måste fylla högre anspråk, än att allenast vara lättlärt och lätt användbart. Kortare noveller, provstycken ur större verk, populärvetenskapliga och historiska artiklar m. m., komma att införas såväl i original, som i översättning, och förlita vi oss på att Esperanto, tack vare dess stora böjlighet och klarhet, därvid skall befinnas tillfredsställa även rätt höga fordringar.

På grund av avsevärt ökade omkostnader, bland annat stegrade papperspris, har en mindre höjning i prenumerationspriset måst vidtagas. Vi tillåta oss uttrycka en förvissning, att denna åtgärd uppfattas såsom nödvändig.

Till sist anhålla vi om de nordiska esperantisternas välvilja för vår lilla tidning även för år 1916 samt medverkan till att densamma göres känd och spridd i allt vidsträcktare kretsar, till förmån för den mellanfolkliga hjälpspråkrörelsen.

Redaktionen.



Bär Esperantostjärnan!

Norvegaj esperantistoj kun svedaj gastoj.



Antaŭa vico: S:ino Klingenberg, S:ino Helsing, S:ro Klingenberg, S:ro Helsing.

La ceteroj: F:ino Jörgensen, F:ino Finholt, F:ino Olsen, S:ro Rifling, F:ino Aagot Johansen, F:ino Jansson.



Tyskland.

Facktidningen »Thüringer Lehrerzeitung» har framhållit önskvärdheten av franska och engelska språkens slopande i mellanskolorna, och deras ersättande med Esperanto.

I tidningsreferat från en hotellägareorganisations sammanträde i Leipzig meddelas ett beslut, enligt vilket de tyska hotellens matsedlar framdeles komma att avfattas på tyska och Esperanto.

I postkontoret i fånglägret i Zossen tjänstgöra 3 franska och 1 rysk fången esperantist, och hava dessa därvid befunnits vara av mycket stor nytta såsom tolkar.

I realgymnasiet i Augsburg hållas även under innevarande vinter, med tillstånd av undervisningsministeriet, två esperantokurser under ledning av prof. Herrenreiter och d:r Ledermann.

Kommittén i Leipzig för hjälp åt krigsinvalider har anordnat undervisningskurser för yrkesutbildning. Esperanto är ett av de ämnen, som ingå i dessa kurser.

Österrike.

I interneringslägret i Linz pågår en esperantokurs med 25 deltagare (italienare).

Schweiz.

Inom esperantoföreningen i Bern har bildats en »litteraturklubb».

Schweiziska esperantosällskapets nyinrättade byrå i Bern (10, Hotelgasse) har redan visat sig vara till stor nytta.

Ny kurs i Lugano.

Spanien.

I likhet med under flera föregående år, hålles även i vinter en esperantokurs vid universitetet i Barcelona.

Italien.

Såsom redan länge varit förhållandet i Tyskland och sedermera även i Frankrike, har Esperanto nu också i Italien tagits i användning för spridande i andra länder av trycksaker om kriget. Den första broschyren innehåller Statsminister Salandras tal den 2 juni.

Frankrike.

Esperantoföreningen i Sarthe har åtagit sig att med hjälp av tyska esperantister söka underrättelser om försvunna krigsdeltagare, för att därigenom bistå dessas anhöriga. Av de 30 personer, som upptogs å den första till Tyskland sända förteckningen, ha 6 återfunnits.



Sveda Kroniko.

Stockholm.

Okaze de la granda festo sur Skansen la 6an de novembro por la memoro de reĝo Gustav II Adolf, la klubo esperantista *Verda Stelo* havis improvizitan sed tre agrablan kunvenon ĉe »Höganloft». En la esperantista festo partoprenis ankaŭ du fremdlandaj samideanoj, S:ino Beaudijon el Paris, membro de la franca delegacio en Stockholm, kaj angla fraŭlino, M. Amsen el Birmingham. Kelkaj studentoj — anoj de okazinta esperantokurso por la studentoj ĉe Stockholms Högskola (la universitata lernejo de Stockholm) — partopreninte en la bela torĉa defilado, ankaŭ ĉeestis nian kunvenon, kaj la esperantistoj pli kaj pli amasiĝis ĉe Höganloft. En la nomo de la klubo nia sekretario, S-ro Rosengren, salutis en Esperanto la ĉeestantojn bonvenintaj, kaj en la franca kaj angla lingvoj niajn neesperantistajn gastojn, klarigante al ili en paroladeto nian movadon. Sekvis vigla interparolado, kaj dum la supeo okazis toastoj, novaj paroloj k. t. p. Kiel fino de la agrabla festo estis aranĝita promenado sur Skansen.

Mefistofeles.

* * *

Okazis la 28an de oktobro publika parolado pri Goethe, liaj vivo kaj verkado, farita de la sekretario de »Verda Stelo», S:ro Teodor Rosengren. La sukcesplena literatura vespero estis aranĝita de la loĝio S:t Eriks Banér de I. O. G. T.

* * *

La esperantoinstruado en la tendaroj de militkaptitoj en Germanujo estas menciita en raporto de Preposto G. Hogner, kiu vizitis kelkon da kaptitejoj laŭ komizio donita de la sveda ĉefepiskopo.

* * *

El la serioza Stokholma gazeto *Dagen* - la 21an de oktobro, ni ĉerpu jenan tekstspecimenon:

»Antaŭ kelke da tagoj la gazetaro komunikis, ke oni en Germanujo generale forstrekis la francan sur la manĝokartoj, anstataŭigante ĝin per Esperanto*). Unu el la kunlabor-

*) La gazetoto efektive ne estis tia, sed citis nur la decidon, ke oni iam *uzos* Esperanton flanke de la germana lingvo.

antoj de Dagen, kaŭze de tio, interparolis kun D:ro Guinhard, laŭscie unu el la plej talentoplenaj kaj plej entuziasmaj pledantoj en nia lando por enkonduko de mondhelpingvo. D:ro Guinhard ne estis tute konvinkita, ke la sciigo pri uzo de Esperanto sur la germanaj manĝokartoj estas tute ĝusta. Ke la franca estas forstrekita, certe estas vere. Sed, plej versaĵne, ĝi estas anstataŭigita per Ido, kiu en Germanujo forte rapidpenetris en la antaŭfundo, eble precipe pro la energia laboro de Profesoro Ostwald.»

En la daŭrigo S:ro Guinhard konfirmis, ke la urba statistika oficejo, kies ĉefo estas li mem, dissendis idoistajn propagandilojn en diversajn landojn.

Prosit! germanaj esperantistoj!



Nigraj okuloj.

Kanon apud bord' rivera
Nepre la tali' similu,
La okuloj nigre brilu,
Estu la statur' fiera.

Enuigaj melodioj,
Blondulina ambabilo,
Palaj revoj en lunbrilo,
Jam min tedas idilioj.

Sang' en vangoj, blankaj dentoj,
Forta vin' kun fajrkoloro
Kaj de la nektar' odoro,
Sendi kantojn kun la ventoj,

Ami flamojn: jen pasia
La deziro, kiu ĉiam
Min plenigas, depost kiam
Kaptis min rigardo cia.

Estu la statur' fiera,
La okuloj nigre brilu,
Nepre la tali' similu
Kanon apud bord' rivera.

Laŭ Daniel Fallström
imitis X.



Malnova sentenco en nova formo.

»Montru al mi viajn gazettelranĉaĵojn, kaj mi klarigos vian karakteron.»

-boso-

Juliette iras al Firenze.

Kristnaska novelo de **Ady Endre**.
(El la kolekto »Palaj homoj kaj historioj»)

Juliette eksopiras la kison de siaj maljunaj gepatroj. Dum kvin bruaj jaroj ŝin ne turmentis tia emocio. Budapeŝton ŝi venis kiel malsata, maleleganta, malbone nutrita fraŭlino. Tie la fraŭlinoj trovas alion por fari. Siajn dentojn ŝi devas flegi. Ili estu tre belaj, blankaj. Nur per tiaj dentoj estas eble ek-mordi virojn kaj monon.

Juliette bone manĝegis el la vivo. La filino de la maljunaj, invalidaj gebienadministrantoj. Juliette tute enterigis Junjon. Eĉ ŝi ne volis memori la kamparan dometon, de kie ŝi elflugis. Sed kiam ŝi jam povis bani sin en odora banakvo ĉiutage, tamen vekigis Junjo. Juliette rememoris la malgrandan kamparan domon. Ambaŭ malgrandajn gemaljunulojn. La patron, kaj la patrinon, kiu povis treege plori antaŭ kvin jaroj. En tiaspecajn virinojn delikataj sentoj loĝigas tiam, kiam la haŭto jam delikatiĝis. Juliette mastrumadis bonege. Kiel decas al filino de ekonomo. Jam ŝi havis monon. Kaj ofte ŝin okupis jam varmaj sentoj.

Jus ŝi disiĝis de unu el siaj amikoj. La kompatinda junulo havis grandan kulpon. Li ŝanĝis sian lastan milkronan banknoton.

En neĝa decembra tago skribis leteron Juliette al sia patro. Ke eble ŝin ili ploris kaj funebri. Kvankam ŝi vivas. Antaŭe forŝiris ŝi de hejme, ĉar volis labori. Kaj nun ŝi volas maljuniĝi en la kampara domo. Budapeŝto ne estas kruela urbo. Kiu povas labori, tie ĉi povas vivi belege. Multe ŝi penadis dum la kvin jaroj. Sed ĵen, ŝi nun havas oficon. Jam ŝi kuraĝas iri antaŭ siajn adoratajn gepatrojn. Proksimiĝas la tago de Sankta Kristnasko. Ŝi volas hejme esti tiun vesperon. Ŝi volas klini sian kapon sur la genuojn de sia panjo, kiel antaŭe. Volas aŭdi la kantaĉon de la bovŝervistknabo. Volas kartludi pri juglandoj kun sia patro. Ripozu volas ilia malgranda Junjo. Ilia malgranda Junjo; tiel ŝi skribis.

Forsendinte la leteron ŝi ne dormis dum pluraj tagoj. Renoviĝis ĉiuj memoroj de ŝia infanaĝo. Kun plora, spitvola sopiro ŝi deziris la

hejmon. Hejmen ŝi iros, ŝi iros, eĉ se ili ne volas tion. Ŝi volas puriĝi hejme, en la kampodomo.

Ŝi ploris kaj ridis, kiam ŝi ricevis la leteron de sia patro. La grandaj malelegantaj literoj preskaŭ kriadis ĝojon kaj amon. — Kun kampara ĝojo dancis la literoj de la maljuna bienadministranto. Venu, venu hejmen, Junjo. Bondona estos la ĉitujara Kristnasko. Hejmen portos la perditan filinon.

Sin preparis feliĉe Juliette. Ŝi rigardis super la altaj negkovritaj tegmentoj de la Budapeŝtaj domoj. La kampodomon ŝi jam vidis. Flugas hejmen sur sonorila glitveturilo. La maljunulo mem venis por veturigi sian filineton. Hejme ornamadas la ĉambron de Junjo la maljunulino, patrino de Junjo.

Ŝi envagioniĝis en preskaŭ freneza febro. Poste kalkuladis. Per la rapidvagonaro ŝi devas veturi ĝis tagmeze. Poste ŝi devos atendi ĉe iu stacio. Ho, terura estas la atendado! Poste ŝi sidigos en malgranda provinca vagonaro. Ŝi alvenos la kvinan horon posttagmeze. Poste ŝin hejmen flugigos la glitveturilo dum unu horo; bele estos, kiel bele estos! Frostremis kaj brulis la tuta korpo de Juliette.

Por matenmanĝi Juliette iris en la manĝovagonon, kaj tie ŝi sidigis kontraŭ iu sinjoro. Eĉ ŝi lin apenaŭ rigardis. Je kio ŝi estus scivola hodiaŭ? Je nenio, neniu, nur je siaj oraj, karaj, maljunaj gepatroj. Kaj je iu, kiu estas ŝi mem, je Junjo, la mastrumistfilino kampara. Ŝi jam ne estas Juliette, ŝi jam estas Junjo.

Tamen Juliette levis la vizaĝon al la manĝanta kunsidanto, kaj tuj ŝi treege ektimis. Minacantan, bruegantan danĝeron ŝi sentis. Ekfrotetis sian frunton per la punta malgranda postuko. Kvazaŭ ŝvito tie gutadus. Ŝi ĝin deviŝis kaj glitigis la tukon al siaj lipoj. Tiam ĉio senbridiĝis. Kvazaŭ Junjo estus defalinta el la vagonaro, Juliette laŭte ekridis.

— Kien vi metis viajn lipharojn, Rudolfo?

La viro ankaŭ ridis. Li atendis tiun ĉi ridan proksimiĝon. Li rideitis al Juliette.

— Sekve de funebro. Mi vin funebras.

— Kaj kien vi vojaĝas, Rudolfo?

— Nu, ĉi tion mi ne scias. Vi povas ankoraŭ memori ĉi tiun mian kutimon. Eble ien, suden.

— Ĉu vi ektimis la vintron?

— Vere la vintron, malgranda Juliette. Terura turmento estas la vintro por homoj tiel delikathaŭtaj

kiel ni. Vane mi varmigas min. Mi ja eĉ ne sentis varmon depost tiam, malgranda Juliette. Ĉu vi scias, depost kiam?

Juliette ree ridis. Tamen ŝia koro frapegis. Kion tio signifas? Ĝuste Rudolfo ŝi renkontas. Tiun ĉi viron eble iam ŝi amis. Li estis la unua, kiu eksentis la estontan belegan, nerveman, adoratan Juliette en la malgranda, maleleganta mastrumistfilino. Kompreneble, al li ŝi devis esti plej kruela. Kaj nun ŝi renkontas lin. Ĝuste lin.

Juliette sentis, ke ŝi devas ruzadi. Ne estas permesite diri, kien ŝi veturas. Sed la viro ne demandis ŝin. Per siaj ironiaj kaj lacaj okuloj li observis iome la vizaĝon de Juliette, kaj poste monotone, seke, preskaŭ murmure, kiel la pastro la Ave-Marion, li diris al Juliette:

— Morgaŭ estos Kristnasko. Junjo de la gemastrumistoj rememoris, ke ŝi ne naskiĝis kiel Juliette. Kaj ankaŭ sufiĉaj estas la kvin jaroj. Juliette volas esti ree blanka Junjo. Do ŝi iras hejmen al panjo kaj paĉjo. Por sankta festo de Kristnasko. Sed tio estas malsaĝaĵo. Post kvin tagoj vin pli naŭzos la kampara domo, ol antaŭ kvin jaroj, kaj poste vi ree rifuĝos al Budapeŝt! Sed tiam vi estos jam tre maldolĉa, Juliette. Tiam vi havos jam nenion. Havu vi la kampodomon, kaj ne iru tien. Tiaspecaĵojn oni konservu kaj evitu, kiel ian sorĉan sekreton! Aŭ kiel mi konservas kaj evitas iaman ĉastan fraŭlinon, pri kiu mi iam kredis, ke ŝi donos al mi la Feliĉon. Sed ŝi edziniĝis, kaj depost tiam mi ŝin ne vidis. Mi eĉ ne volas vidi ŝin. Mi scias, ĉio estus finita. Kaj oni bezonas ion, kampodomon, virinon, kio ĉiam restas malproksima. Ne iru hejmen, Juliette!

Juliette jam ploris, kaj plore ŝi demandis:

— Sed kien mi iru?

— Venu kun mi, malgranda Juliette. Ni iros kune en Firenzon. Se tie ne estos bone, ni iru pluen, kien vi volos. Atentu, ankaŭ mi volis iri ien. Ankaŭ mi tial kuras, ĉar mi volas konservi lokon, kien estas permesite ĉiam nur intenci.

La rapidvagonaro alvenis tien, kie devus Juliette elvagoniĝi. Juliette pretigas sin, ekiras. Poste ŝi rigardas la vizaĝon de la viro. Kaj plore ŝi refalas. Ŝi frostremas, kaj sin kovras per siaj kovriloj. La viro elsaltas el la vagonaro, kiu haltas dum kelkaj minutoj. Li revenas kaj raportas:

— Ĉio estas en ordo, malgranda Juliette. Vi venas kun mi. Ni iros en Firenzon.

La vagonaro ekiras. Juliette krie kuras al la fenestro de la vagonfako. Vidas la linion de la serpentina provinca fervojo. La grandan, blankan mondon. Aŭdas tintilojn. La maljuna mastrumisto nun veturas kun tintila glitveturilo al la stacio. Li iras por veturigi sian filinon, Junjon, kiun Sankta Kristnasko sendas hejmen.

El la hungara lingvo
tradukis Rudolfo Rajczy.



La vulpĉaso.

»Veku min frue morgaŭ!«¹⁾ la reĝo diris al sia servisto. »Ni iros²⁾ por ĉasi vulpon.« — La servisto riverencis. »Veku min frue morgaŭ!« la servisto diris al malgranda bubo. »Ni iros por ĉasi vulpon.« — »Jes«, la knabo diris, iris al la hundo sur la korto, kaj diris: »Veku min frue morgaŭ! Ni iros por ĉasi vulpon.« — »Vaŭ«, la hundo diris, turnis sin al la koko, kaj diris al ĝi: »Veku min frue morgaŭ! Ni iros por ĉasi vulpon.« — Kaj ja koko palpebrumis je la maldekstra okulo; tio signifus jes. Kaj ĉiu iris al sia dormejo.

Sed la vulpon oni devas atenti,³⁾ ĉar ĝi havas longajn orelojn. Ĝi estis aŭdinta ĉion⁴⁾. »Ha ha!« ĝi diris al si mem. »Jes ja⁵⁾, vi iros por ĉasi vulpon. Tiam ankaŭ mi devus esti kune. Sed tio ne okazos⁶⁾ tiun ĉi fojon⁷⁾.« — Eble vi kredas, ke la vulpo forkuris kaj kaŝis sin. Ne, ĝi ne faris tiel. Ĝi ŝteliris en la gekokejon⁸⁾, kaj prenis la kokon. »Nu, tiel!« diris la vulpo kurante en la arbaron⁹⁾.

La nokto pasis, kaj mateno estiĝis¹⁰⁾. La hundo fidis al la koko¹¹⁾, kaj do la hundo dormis trankvile. La malgranda bubo fidis al la hundo, kaj do la knabo dormis. La servisto fidis al la knabo, kaj do dormis la servisto. La reĝo mem dormis ĝis la tagmezo¹²⁾. Tiam li vekigis¹³⁾, kaj batadis¹⁴⁾ ilin ĉiujn per sia granda sabro. Kaj ili ĉiuj ploris tre malgajaĉe¹⁵⁾, akuzante¹⁶⁾ la kokon kiel kulpa¹⁷⁾, ĝis kiam la vento portis sur la korton¹⁸⁾ kelkon¹⁹⁾ da kokplumoj. Tiam ĉiuj eksciis, kio okazis rilate al la koko²⁰⁾, kaj ke ne estas²¹⁾ ĝia kulpo.

»Ne, certe ne estas ĝia kulpo», diris la vulpo, kiu²²⁾ ridetante²³⁾ staris ekstere. »Alifoje²⁴⁾ fidu al vi mem²⁵⁾ sed ne fidu al mi, almenaŭ ĝis kiam vi estos kaptintoj min, sed tio ne okazos hodiaŭ²⁶⁾.» — Kaj post tio ĝi forkuris.

El lerneja krestomatio.

- 1) tidigt i morgon.
- 2) vi skola gå (eller komma att gå).
- 3) men man bör giva akt på räven.
- 4) den hade hört allt.
- 5) javisst.
- 6) men detta kommer icke att ske.
- 7) denna gången (ackusativändelse i stället för preposition för tidsbestämning; adverb skulle också kunna användas: ĉi-tiufoje).
- 8) den smög sig in i hönsuset.
- 9) in i skogen (en la arbaro skulle endast betyda: i skogen).
- 10) och det blev morgon.
- 11) litade på tuppen.
- 12) sov ända till middagen (tago=dag; mezo=mitt; tagmezo=mitt på dagen).
- 13) blev vaken; vaknade (eller väcktes).
- 14) bat-ad is: pryglade.
- 15) suffixet -ac ger en förklenande betydelse åt ordet: malgaje=sorgligt; malgajace=ömkligt, ynkligt.
- 16) anklagande.
- 17) tuppen såsom skyldig (ŝulda har endast betydelsen: skyldig penningar, varor eller dylikt; kulpa betyder: skyldig till ett brott, till ett misstag eller dylikt).
- 18) in på gården (sur la korto=på gården).
- 19) kelko=obestämt räkneord: ett mindre antal; några.
- 20) vad som inträffat (hänt) med avseende på (i förhållande till) tuppen.
- 21) det var icke (i bisatser i Esperanto erhålla verben tidsbestämning i förhållande till huvudsatsen: ett annat exempel: oni raportas, ke estas alta akvo en la rivero, man anmälde, att det var högt vatten i floden; oni raportis, ke estis alta akvo en la rivero, man anmälde, att det hade varit högt vatten i floden).
- 22) vilken, eller: som.
- 23) ridi, skratta; rideti, le; ridante, skratande; ridetante, leende.
- 24) en annan gång.
- 25) lita på eder själva.
- 26) i dag.



Samideanoj!

Abonu "La Espero"!

Por tempasigo

1. Kun P ĝi estas frukto mangata, sed kun H la manganto. Kun D ĝi estas ejo de manganto.

2. Ĉevaliro:

o	d		r	t	p	t	
n	r	n	a	u	f	e	a
s	k	n	g	a	n	a	o
a	a	t	g	s	m	e	t
	n	l	n		r	l	b
t	a	ĉ	a	a	t	o	o
a		i		g	t	o	a
E	r		r	m	n	n	

La enhavo estas citaĵo el tre konata versaĵo.

3. Konstruaĵo, pli alta ol larĝa, konsistas el greno, grava kiel ĉevalnutraĵo. Ĝi estas entrepreni riska.

Solvoj en la januara numero.



Betalt og ikke betalt.

»La Espero» tæller nu 73 + x norske abonnenter (x = de 2 eller flere som abonnerer uten vor formidling), hvorav 43 + x hittil har betalt for indeværende aar, derav igjen 6 kun kr. 1.50 (som for Norv. Esp., medens La Esp. koster kr. 1.60).

Hvorvidt nogen av de øvrige 30 abonnenter ikke har faat alle hittil utkomne numere, og hvorvidt saadant har noget med kontingenten at gjøre, kan vi — idetmindste utenfor Kristiania — ikke uttale os om, da bladet — som bekjendt — omsendes direkte fra hovedkvarteret.

H. B.



Gävle Esperantoförening

Ordinarie månadmöte avhålls tisdagen den 4 jan. kl. 8 e. m. å kafé D' Angleterre. Efter mötet samkväm.

Föreningens bibliotek är flyttat till kafé Esperanto. Böcker utlånas genom bibliotekarien, herr Örn, eller kaféinnehavaren, herr Holmstedt, extra bibliotekarie.

Läs

Templaren

Templarordens officiella organ!
Vaken. & Omväxlande.
Pris pr år Kr. 2:50.

Esperanto per korrespondens.

En korrespondenskurs i Esperanto, varigenom korrespondensmetodens alla fördelar tillämpats på Esperanto, är nu färdig. Det blir härigenom möjligt för var och en att på lediga stunder lära sig det internationella hjälpspråket.

Lättfattlig. Grundlig. Intressant.

Begär prospekt! Erhålles mot porto.

R. Pehrsson, 3-23, Gävle.

Vartför skall Sverige stå efter

de stora länderna i fråga om Esperantos spridning?

Rekvirera propagandabladet och visa alla Edra bekanta!

Pris för 3 st. 10 öre, 100 st. 1:35, 500 st. 6: — och 1000 st. 10: — allt portofritt från

Sveda Esperanta Federacio, Gävle.

Acetebla elkonstruata akvoforto

en la okcidenta Norvegujo preskaŭ unu tagvojaĝon pli norde ol Bergen, kun grundo por estonta fabrikejo apud glaci-libera haveno konvena por la plej profunda iro de la ŝipo al kajo estas montrota ĉe mia kontoro. La prezo estas por uzo tagon kaj nokton po jaro 30 — tridek — kr. skandinavaj po H. P. (75 ^{kgm.}/_{sek.}) aŭ 40,80 kr.s, po 1000 watt'oj. La unuaj 15000 H. P. havigeblaj post 2 jaroj de la tago por subskribo de la kontrakto, kaj plie 15000, se mendotaj, post la plej proksimaj 2 jaroj.

Brynjulf J-hss Klingenberg's Patentkontoro Prof. Dahls Gate 18^{II}, Kristiania, Norge.

L' ESPERANTO

Ĉiumonata Internacia Revuo eldonita sub la aŭspicioj de la ITALA KATEDRO DE ESPERANTO.

En ĉiu numero ĝi publikigas:

Lecionojn de Itala, Latina kaj Portugala Lingvoj per Esperanto
Sinonimaron de E. Metodan Vortaron de E.

Rakontojn, Dramojn, Konkursojn kun monpremioj kaj aliajn interesajn fakojn. — Jarabono por 1915 Fr. 3.25 (Sm. 1.300). La Revuo aperos regule ankaŭ dum la milito. Unua Jarkolekto - 1913 - enhavanta 21 lecionojn de Itala Lingvo Fr. 2 (Sm. 0 800). Dua Jarkolekto - 1914 - Fr. 3.25. - Al la Abonantoj por 1915: 1 Sm. Specim. kontraŭ respondk. Konto ĉe la Ĉekbanko E. - London.

Sin turni al la firmo A. PAOLET — S. VITO AL TAGLIAMENTO (Italia).

HERRAR
EKIPERA SIG BÄST OCH
FULLSTÄNDIGAST HOS

Axel Lidholm

Drottninggatan 30 -:- GEFLE

Josef Wikströms
Tobakshandel
GEVALIAPALATSET - GEFLE

SKODON

Största sortiment hos

A. M. Zimmerman & Co



La Espero

utgives av Gävle Esperantoförening och utkommer omkr. den 15 i varje månad.
Lösnummerpris 15 öre.
Prenumerationspris för Sverige 1: 50., Norge 1: 75.
Prenumeration kan ske dels direkt hos tidningens expedition, **Gävle**, dels genom återförsäljare eller på posten.

Förall vaken ungdom
är S. S. U. H:s organ

POLSTJÄRNAN

värdefull genom sina gedigna artiklar om aktuella, sociala och kulturella spörsmål, samt om litteratur och konst.

Prenumerationspris å posten: helt år kr. 1: 50, 1/2 år kr. 0: 85; hos Polstjärnans exp., Upsala: helt år kr. 1:—, 1/2 år kr. 0: 50.

Esperantopapeterkartong, 25 ark brevpapper + 25 kuvert, damf. 1: 50

" d:o, d:o, herrformat 1: 65

Esperantopieppennor, 30 öre st., 3:— kr. dussin (hårda eller lösa).

Esperantoblyertspennor, 10 öre st., 1:— kr. duss. (hårda eller lösa).

Allt franco.

Beställes hos **W. Wahlund, Gefle.**

Kiam vi bezonas
viandon, mendu
ĉe

FRANS A. OLSON

Telef. 34 • GEFLE • Telef. 34

Central- och Jernvägshotellen

GEFLE

REKOMMENDERAS!

C. J. LINDH

BOK- & DISTRIBUTIONSÄFFÄR

S. FÄLTSKÄRSGATAN 19, GEFLE

Rekommenderar sig vid behov av Böcker, Tidskrifter och Häftesarbeten.

RIKSTELEFON 16 97.

Nyutkommen broschyr:

Världsspraksfrågan - en livsfråga

av Einar Adamson.

Pris 25 öre. Rabatt då minst 10 ex. rekv.

Rekv. från **Gävle Bokförlag, Gävle.**

Wickmans Kappaffär

NORRA KUNGSGATAN 7 - GEFLE

Vid Rådhusplanaden.

Kappor o. Promenaddräkter i stort urval. Beställningar emottagas o. utföras förstklassigt.

RIKSTELEFON 1391.

Gust. Holms Förstoringsanstalt

Brunnsgatan 78, Gefle. •• Rikstel. 16 28.

Faras pligrandigoin laŭ fotografajoj.
Unuaklasa laboro. Petu prezaron!

N. Lundgren
GEFLE - Interurba tel. 151

Kamentuboj por fabrikoj.

Pli ol 800 konstruitaj.

Riparoj dum uzado.

Fulmkonduktiloj estas muntataj.

Propra brikejo en Upsala.

Plej granda firmo por konstruo de fabrikoj kamentuboj en Skandinavio.

Argenta medalon en Stockholm 1897

" " " Gefle 1901

" " " Norrköping 1906

E. Liljemarks

Cigarr- och Tobakshandel

S. Centralgatan 28 och S. Kungsgatan 26

rekommanderas!

Prima varor till billigaste priser.

"LA ESPERO"

Gamla årgångar av La Espero (år 1913 och 1914) finnas i ett begränsat antal och säljas till ett pris av 1 kr. pr st. Varje esperantoförening ävensom varje intresserad esperantist bör äga dessa.

Lösa nummer av tidningen kunna för spridning i propagandasyfte erhållas gratis av intresserade.

Tillskriv **La Esperos expedition, Gävle.**

MEST NÖJDA BLIVA NI MED
ETT BESÖK Å

Café "Esperanto"

DROTTNINGGATAN 29 - GÄVLE

Rikstelefon 201

Inneh.: C. G. Holmstedt.

ESPERANTISTER!

Köp och drick den verkligt goda njutnings- och sällskapsdrycken

ESPERANTO PUNĈO

Alkoholfri.

REKV. FRÅN ANTON ÖSTLING,

Styrmansgatan 36, NORRKÖPING.

Carl Larssons

FOTOGRAFATELIER

NYGATAN 34

Rekommenderas!

TELEFON 3 57

Från **"La Esperos" Expedition, Gefle,**

kan rekvireras utkommen litteratur m. m.

Å lager finnas **Läroböcker:**

Lärobok i Esperanto av

P. Nylén..... 1:— + porto 0: 12

Lärobok i Esperanto av

G. H. Backman..... 1:— + » 0: 16

Lärobok i Esperanto av

Carl Ohlsson..... 0: 50 + » 0: 08

(Alla med Esp.-svensk ordlista)

Esperantospråklära av

O. W. Hjærtstätt... 0: 40 + porto 0: 08

Esp.-svensk ordbok av

P. Ahlberg..... 1: 75 + » 0: 16

Svensk-esp. ordbok av

E. L-son Finn..... 1: 50 + » 0: 12

Esp.-svensk o. Svensk-esp. ordbok av Hjærtstätt..... 0: 60 + » 0: 08

Unua Legolibro av Dr.

Kabe..... 1: 60 + » 0: 12

Nova Testamento

(mjukt band)..... 2: 50 + » 0: 30

"La Espero" oficiala

himno esperantista,

med musik..... 0: 60 + » 0: 04

D:o d:o, propagandablad 0: 05 + » 0: 04

Sveda Kantaro, kun me-

lodioj..... 0: 35 + » 0: 08

Esperantista Kantaro... 0: 75 + » 0: 04

Världsspraksfrågan - en

livsfråga av E. Adamson 0: 25 + » 0: 04

Esperantostjärnor..... 0: 75 + » 0: 10

D:o, (oficiella, för med-

lemmar av U. E. A.) 1:— + » 0: 10

D:o, (miniatyr)..... 0: 35 + » 0: 10

Esperantobordsflaggor 2: 40 + » 0: 30

D:o (något enklare) 1: 75 + » 0: 30

D:o (mindre)..... 0: 85 + » 0: 30

Esperantoflagga..... 0: 50 + » 0: 08

D:o (miniatyr) 0: 15 + » 0: 04

Reklammarken, 25 st. 0: 45 + » 0: 04